ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2026-07-15 ĝis 2026-10-15.

Ŝlosilpunktoj**: **preparado por la sekva komitatkunsido; novaĵoj pri sekcioj (el Hispanio, Pollando, Benino); rezultoj de la ILEI-kongreso-2026: la kongreso-2027; ILEI-UEA-ekzamenoj: la projekto EtoSo; Homa Ĉeno; Universitata agado; la angla traduko de la libro kaj eseo de A.Madella; ILEI dum UK en Graz; intervjuo en Kanada Filmoficejo.

La Komitato

La Estraro finpreparis la bezonatajn dokumentojn por la sekva reta Komitatkunsido (Jarraporto kaj financa raporto kun kontrolo).

La Estraro

Survojas klopodoj pri bankokonto de ILEI, kiu postulis oficiale konfirmitajn kopiojn de pasportoj de tri estraranoj. Karine Arakeljan, la kasistino, estas en konstantaj kontaktoj.

Sekcioj

Survojas ordigo de reguloj pri subteno de sekcioj, kiuj bezonas grandparte la koleghelpan kason. La Estraro decidis, ke la sekcioj, kiuj petas grandparte la helpon de la koleghelpa kaso povas havi maksimume 14 membrojn, por faciligi daŭran kontrolon pri nia membraro. Tiucele Marija Jerković pretigis la specialan formularon.

Septembre la Estraro aprobis novan sekcion de ILEI – la Hispanan, kiu estas prezentota al la Komitato dum la sekva kunsido.

El Pollando

Okazis legado-aranĝoj de esperantistoj (realigitaj la 2026.09.05 kadre de la legado de tre interesa kaj speciala verko de A. Mickiewicz en Pollando kaj en multaj aliaj landoj). Ili estas registritaj en la oficiala retejo de la Prezidanto de la Pola Respubliko. La paĝoj estas videblaj por ĉiuj kaj vizitataj de milionoj da homoj en la mondo, i.a. de multnombraj ĵurnalistoj, bibliotekistoj, instruistoj, fakuloj pri literaturo, sociologoj, studentoj. Tio estas bona maniero videbligi Esperanton por ekstera komunumo kaj por esperantistoj - eblo studi pri altvalora alilanda verko (ĉiujare alia).

Vidu ĉe: Zagrebo, KROATIO - internacia legado

Aktualności \ Inicjatywy \ Narodowe Czytanie \ 2026 Dziady \ Uczestnicy akcji \ Oficjalna strona Prezydenta Rzeczypospolitej Polskiej

En JAPANIO - ĉeesta legado

Aktualności \ Inicjatywy \ Narodowe Czytanie \ 2026 Dziady \ Uczestnicy akcji \ Oficjalna strona Prezydenta Rzeczypospolitej Polskiej

Ĉeesta legado en Krakovo, POLLANDO - Jagelona Universitato

Aktualności \ Inicjatywy \ Narodowe Czytanie \ 2026 Dziady \ Uczestnicy akcji \ Oficjalna strona Prezydenta Rzeczypospolitej Polskiej

Aktualności \ Inicjatywy \ Narodowe Czytanie \ 2026 Dziady \ Uczestnicy akcji \ Oficjalna strona Prezydenta Rzeczypospolitej Polskiej

ILEI gratulas niajn polajn samideanojn kaj aparte Maria Majerczak!

El Benino

Niaj samideanoj ekhavis novan oficejon en Lokossa, la ĉefurbo de la departamento Mono, sudokcidente de Benino. Temas pri Centro por informado kaj antaŭenigo de Esperanto kaj Naciaj (gepatraj) lingvoj Beninaj. La oficejo servas kiel: sidejo por la Bénina NRO "Infanoj Ĉirkaŭ Afriko", kursejo por franclingvanoj, anglalingvanoj kaj fakuloj, kiuj interesiĝas pri Esperanto-lernado, informejo pri Esperanto kaj Naciaj/gepatraj lingvoj.La Centro entenas du bretarojn kun kelkaj instru-lernmaterialoj en Esperanto, en la franca, en la

angla kaj en la naciaj lingvoj. ***ILEI gratulas niajn beninajn samideanojn kaj bonvenigas mecenatojn subteni la oficejon.***

ILEI-Kongreso-2026 kaj Simpozio 2026

ILEI-kongreso-2026 pasis en Ĉinio en la urbo Zaozhuang de Shandong-Provinco la 10-16-an de julio ĉe Zaozhuang-a Universitato, kie estas sidejo de la plej granda Esperanto-Muzeo de Azio kaj funkcias la sola aktuala Esperanto-fako, oficiale agnoskata de la Ĉina Registaro. La temo de la Kongreso estis "Eduki profesiajn esperantistojn kaj protekti Esperanto-kulturon", de la Kongresa Simpozio – "Plialtigi lingvan konscion". Ambaŭ aranĝoj havis tre buntan kaj imponan preleg-programon. 26 doktoroj, profesoroj kaj fakuloj el 17 landoj prelegis kaj diskutis dum la Simpozio, organizita de Alessandra Madella, pri diversaj temoj, ligitaj kun instruado, lingvoj kaj apudaj disciplinoj. Okazis tri seminarioj pri la kongresa temo, ĉiuj dum la unuaj tagoj: ILEI-seminario en Orienta Azio (ISOA), Internacia Seminario pri Esperanto-Instruado, Seminario pri protektado de Esperanto-Kulturo. Okazis KER-ekzamenoj de UEA subgvide de Katalin Kovàts, Ekzamenoj de ILEI-UEA, kun komisiono konsistanta de Laura Brazzabeni, François Lo Jacomo kaj Alessandra Madella, Gazetara konferenco, Vizito al la Esperanto-Muzeo, Aŭkcio, arbo-plantado, transdono de gratul-tabulo. Okazis kursoj je du niveloj: por komencantoj kaj progresantoj. Multis kutimaj kaj ŝatataj aliaj programeroj: Nacia-Internacia kaj Filma Vesperoj, Bankedo, temaj ekskursoj k.a.. La lastaj tri tagoj de la Kongreso estis tute dediĉitaj al la esplorado de la kultur-riĉa provinco Shandong, hejmloko de famaj filozofoj Konfuceo kaj Mozi. La kongreso, jam kiel kutime, pasis hibride, ĉeeste kaj virtuale. Entute aliĝis al la kunveno 192 personoj el 24 landoj. En la Kongreso aktive partoprenis la estroj de la Zaozhuang-a Universitato. Videoj de la Kongreso kaj de la Simpozio spekteblas ĉe la jutuba kanalo “Esperanto + Edukado ILEI”.

La Estraro klopodas finkalkuli elspezojn kaj enspezojn de la pasinta kongreso. La detala raporto sekvos. Pri la kongreso, kiel kutime, aperis raportoj en diversaj eldonaĵoj: en IPR, JA, *La Ondo de Esperanto*, *Esperanto*, UEA facila: https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/esperanto-kunigas-nin-instruistoj-kongresis-en-%C4%89inio-r530/ Intervjuoj kun partoprenantoj aperis en la retejo de Ĉina Komunikila Grupo.

ILEI-kongreso 2027

Dum la Komitat-kunsido 2026.07.04 kaj la ILEI-kongreso en Zaozhuang estis oficiale anoncita la loko kaj la datoj de la sekva jubilea 60-a kongreso-2027. Survojas preparado. Jam pretas aliĝilo kaj logotipo, estas dissendita invito aliĝi al la kongreso. Komenciĝis preparado de la kongresa Simpozio.

Kapabligo

Daŭras ellaboro de la nova sistemo de ILEI-UEA-ekzamenoj. Por la ekzameno en Zaozhuang dum la 59-a ILEI-kongreso estis aprobitaj kelkaj ŝanĝoj en la regularo faritaj parte por adaptiĝi al la loka situacio kaj parte por respondi al sugestoj de Ilona Koutny. La Estraro plu klopodas organizi materialojn kaj komisionon por planata ekzameno en Argentino dum la Argentina kongreso novembre.

Projektoj

Projekto EToSo

Survojas kunlaboro de la Estraro kun Françoise Noireau kadre de ŝia agado pri Esperanto-instruado en Afriko pere de EToSo. La Estraro decidis helpi al Fransoazo per 500 eŭrojn kaj organizas taksadon de ŝiaj instruaj materialoj laŭ ŝia peto.

Homa Ĉeno

La plej freŝa epizodo de la Homa Ĉeno laŭ ideo de Maximiliano Garcia. Entute la Ĉeno enhavas ĝis nun 1225 homojn el 45 landoj: https://www.youtube.com/watch?v=pyURHQlJeWk

Universitata agado

La 75-a Kunpensigado okazis la 5-an de Oktobro 2026. Grant Goodall parolis pri ESF (Esperantic Studies Foundation) kaj la ĉefaj kampoj, kiujn ĝi subtenas (Esplorado, Edukado, Konservado). Interesa diskuto estis pri la eblaj estontaj agadkampoj, precipe koncerne la uzo de apoj kaj AI.

Gong Xiaofeng (Arko) prezentis la retan instruadon de Francesco Framceschini en Ĉinio, kiuj iris de infanoj al 3 universitataj profesoroj de Tianjin-a Universitato de Scienco kaj Teknologio. La kursoj okazis per la apo Voov kaj partoprenis multe da gvidantoj de lokaj asocioj de Ĉinio. Plu Francesco bedaŭrinde ne povas daŭrigi sian instruadon ĉi-jaron, tial Arko serĉas alian volontulan instruiston, precipe por la 3 universitatanoj.

Katalin invitis ĉiam registri siajn kursojn en la kursejon de Edukado.net.

Luis Obando tre klare priskribis la grandan retan instruadon al hispan-parolantoj. Partoprenas 900 lernantoj kaj nuntempe ĝi ankau ofertas kurson en la indonezia (por 25% de la lernantoj). La apoj uzataj estas google-meet kaj google-classroom. Du instruistoj de la mezgradaj kursoj (nur en Esperanto) havas la KER-nivelon C2. Vidu ĉe https://youtu.be/Kvu2uGlLwTo

la 74-a Kunpensigado pri Esperanto en universitatoj okazis la 2026.09.07.Ekaterina V. Bebenina, la lasta studentino de Helmar Frank, prelegis pri metalingvistika kompetento kaj la eblo pripensi sur tiu bazo interfakan kaj metafakan instruadon. Ŝi tiel resumis tri brilajn artikolojn, kiujn ŝi verkis por Internacia Pedagogia Revuo kaj kiuj inspiris la temon de la Simpozio de ILEI 2026, "Plialtigi lingvan konscion": Materialoj de kaj pri Helmar Frank aperos estonte en la retejo de AIS, kiun Ekaterina estas nun renoviganta.

https://youtube.com/playlist?list=PLHLKJzryhzC0&si=K25XA4iniK1RGBx0

Philippe Planchon kaj Pascal Dubourg Glatigny parolis pri sia sukcesa instruado ĉe la Universitato de Tours, kadre de Erasmus-projekto. La kurso ekis rete kaj finiĝis per 8 ĉeestaj tagoj en Tours. Partoprenis 27 studentoj, el kiuj nur unu jam esperantisto, kaj instruis 10 instruistoj el diversaj universitatoj. Ili kovris ne nur la instruadon de Esperanto (Dennis Keefe), sed ankau tre interfakan programon, de filozofio al lingvistiko al kulturaj studoj. Estis triparta fina ekzameno kaj la kurso estis kalkulata kiel 6 universitataj kreditoj. Venontan jaron la sama programo okazos ĉe la Universitato de Varsovio. Interesataj studentoj povas sin anonci. La devenaj universitatoj de la studentoj kovros la vojaĝkostojn kaj la organizanta universitato ricevos monon por organizi riĉan programon, kiun ĉi-jaron inkluzivis ankaŭ turismon. Pascal varbadis por interfaka konferenco pri Esperanto, kiun li estas organizanta en Parizo, kie ĝi okazos nur ĉeeste 9-11.06.2027. La limdato por sendi proponojn estas en oktobro. Estos stipendio por doktoriĝantaj studentoj por kovri la loĝadon en Parizo. Por informoj kaj proponoj: retadreso: shesl-esperanto-2027@listes.u-paris.fr
retejo : https://shesl.org/en/2027-esperanto-2/

Vidu ĉe: https://youtu.be/Rp94fWucXnI?si=q_X-_FJg293-33NY

Eldonado

Survojas preparado de eldono de la angla traduko de la libro de A.Madella *Esperanto: facile lernebla.* Komenciĝis la prepara laboro por *Aktoj de la Simpozioj 2025-26*, la Estraro aktive pripensas pri eldonejo.

IPR kaj JA

Ni havas bonegan novaĵon de niaj samideanoj el Hispanio – de la Valencia Esperanto-Grupo (VEG): ĝia Prezidanto Raúl Salinas laŭ la iniciato de Dennis Keefe kreis kompletan indekson por IPR: ĉiuj jaroj de IPR, ĉiuj numeroj, ĉies artikoloj kun helpo de AI! Tiu bazo estos tre valora kaj utila ilo ne nur por ILEI, sed por ĉiuj, kiuj volas esplori la historion de Esperanto-instruado kaj la kontribuon de kaj al IPR. ***La Estraro kore dankas niajn valenciajn kolegojn***

pro tiu grava laboro! VEG okazigas ankaŭ aliajn interesajn esplorojn kiuj same povos esti utilaj por Esperantujo.

ILEI en la Reto

Ni havas ĝojigan novaĵon: la jutuba kanalo."Esperanto + Edukado" ILEI atingis 100 000 vidojn! Kaj lastatempe spektas ĝin iom pli (60%) da homoj, kiuj ne registriĝis (t.e. novaj spektantoj), iom pli da viroj (60%), kaj iom pli junaj homoj, ĉar estas reprezentata sufiĉe bone ankaŭ la aĝ-grupo inter 35 kaj 45 jaroj. (Por doni senton de proporcioj, la jutuba kanalo UEAviva de UEA preskaŭ atingis 400 000 vidojn.) ***Gratulon al ĉiuj ILEI-anoj kaj grandan dankon al tiuj, kiuj konstante klopodas prosperigi nian kanalon!***

Kunlaboro kun enmovadaj institucioj

Kun UEA

Kiel kutime, ILEI partoprenis en Movada Foiro dum UK en Graz, Aŭstrio. Tie estis disdonitaj malnovaj numeroj de IPR kaj JA.

A. Madella prelegis la diplomlaboraĵojn pri Esperanta ĵurnalismo ĉe Zaozhuang-a Universitato dum la Tago de Lernado, pri la biologo Oka Asajirō, la unua esperantisto de Japanio, dum la Internacia Kongresa Universitato kaj pri la teatraĵo “1910” de Ĵenja Amis dum la Esperantologia Konferenco en Graz. Krome aperis ŝia eseo “La Esperanto-eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton en la debatoj pri lingva edukado” en la nova numero de *Esperantologio / Esperanto Studies*. Ĝi prezentas la konatajn rezultojn de la eksperimentoj de Edward Lee Thorndike kaj Helen S. Eaton pri Esperanto, sed metas ilin en la pli vastan kuntekston de la tiamaj debatoj pri lingvoedukado, psikologio, “mensa disciplino”, transfero kaj progresema edukado. Legu ĉe: https://interlingvistiko.net/en/interlinguistics/esperantologio-esperanto-studies-2026/

Nia kolegino Marija Belošević jam komencis prepari la Tagon de Lernado por UK en Aŭstralio, kiu okazos 2026.07.06

Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj

Ĉina Komunikila Grupo kaj Nacia Filmoficejo de Kanado

Du-parta intervjuo kun Donald McWilliams pri dokumenta filmo, kiu reverkas la historion de kanada kinarto, montrante la ŝlosilan rolon de filmistinoj en la Filmoficejo de Kanado:

https://esperanto.cgtn.com/2026/08/26/ARTI1787708757632804

https://esperanto.cgtn.com/2026/08/26/ARTI1787709076299960

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI: Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI: Ahmad Mamduhi

2026-10-16